WIKIPEDIA

Galega lingvo

La **galega lingvo** (ISO-kodo ISO 639-2: *glg*, ISO 639-1:*gl*) estas latinida lingvo tre simila al la portugala aŭ, kiel tradicie defendas lingvistiko, dialekto de la portugala.

Ĝi estas parolata precipe en nordokcidenta Hispanio en Galegio. Entute 3 milionoj da homoj parolas ĝin. Ĝi ankaŭ estas ofte parolata en la tre abunda elmigrinta galega diasporo.

Galega	
Galego	
Parolata en	Galegio (Hispanio)
Parolantoj	2 500 000
Denaskaj parolantoj	3.188.400
Skribo	latina
Lingvistika klasifiko	
Hindeŭropa lingvaro	
Italika	
Latinida	
Oficiala statuso	
Oficiala lingvo en	Galegio
Reguligita de	Reĝa Galega Akademio
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-1	gl
ISO 639-2	glg
ISO 639-3	glg
Glottolog	gali1258
Angla nomo	Galician
Franca nomo	galicien

Enhavo

Historio

Kritiko

Literaturo en la galega lingvo

Vidu ankaŭ

Eksteraj ligiloj

Notoj kaj referencoj

Historio

La galega lingvo estas pli-ol-miljara lingvo kiu pro politikaj cirkonstancoj eniris tunelon de altrudita silentado en la unuaj jardekoj de la 16a jarcento. Iom post iom ĝi iĝis diskriminaciilo kaj kaŭzo de morala kaj korpa sufero de multnombraj generacioj. La seninterrompa parola uzo fare de modestaj homoj kaj la laboro de la elita intelektularo, kiu de la 19a jarcento sukcesis revalorigi ĝin, ebligis la savon de la hodiaŭa ĉefa identiga trajto de galegoj kiu laŭ Prolingua[1], ĝi estas samtempe esenca bazo de la galega kulturo. La laboro de ĉiuj tiuj homoj ebligis ke hodiaŭ Galegio estas historia nacieco kaj disponas politikan aŭtonomecon. Siavice la diversaj aŭtonomaj registaroj metis la fundamenton por la socia restarigo de la galega lingvo, ĉefe en la kampoj de instruado, administracio kaj publikaj amaskomunikiloj[2].

mapo pri la lingvoj parolataj sur la Ibera duoninsulo: la galega bildigita mezverde

Kritiko

Ekzistas polemiko pri la memstara karaktero de la lingvo. Laŭ opinio de granda parto de lingvistoj, la galega kaj la portugala estas unusola lingvo, dum aliaj konsideras ke post jarcentoj de diverĝo, ĝi povas esti konsiderata memstara. La interkompreniĝo inter ambaŭ variantoj estas sufiĉe facila. La galega ankaŭ estas bone komprenata de hispanlingvanoj.



vokaloj de la galega lingvo

La polemiko etendiĝas al la literatura normo kaj al la ortografio. La oficialan normon flegas la Reĝa Akademio de la galega lingvo, kies ortografiaj priskriboj estas proksimaj al tiuj de la hispana lingvo. Ekzistas diversaj grupoj kiuj favoras alternativan normon kaj ortografion, pli proksiman al la portugala lingvo, el kiuj ili ankaŭ emas preni la neologismojn. La movado por ortografia unuecigo kun aliaj variantoj de la portugala nomiĝas *reintegrismo* (*reintegracionismo).*

Literaturo en la galega lingvo

- Literaturo en la galega lingvo
- Rosalía de Castro
- Castelao
- Manuel Rivas
- Helena Villar Janeiro
- Begoña Paz

Vidu ankaŭ

- Lingvistiko
- Listo de lingvoj
- Lingva familio

Eksteraj ligiloj

- http://gl.wikipedia.org Galega Vikipedio
- http://www.realacademiagalega.org Reĝa Akademio de la Galega Lingvo
- http://www.agal-gz.org Asocio Galega de la Lingvo (asocio kiu favoras ortografion pli proksiman al la portugala)
- http://www.aglp.net/ Akademio Galega de la Lingvo Portugala (ankaŭ favora al portugaleca ortografio - Nova ortografio)
- http://www.mdl-galiza.org Movado por la defendo de la lingvo (ankaŭ favora al portugaleca ortografio)
- http://www.ethnologue.com/show_language.asp?code=glg La galega en Ethnologue (angle)
- http://www.bvg.udc.es Virtuala Galega Biblioteko
- http://www.galego.org Organizo favora al la galega (en norma ortografio)

Notoj kaj referencoj

1. ↑ ProLingua estas platformo por la defendo kaj akcelo de la galega lingvo. ProLingua rifuzas iun ajn pretendon pri ĝia alproprigo aŭ aljuĝo al ajna grupo aŭ ideologio.

2. ↑ *Manifesto pri la galega lingvo (http://www.prolingua.gal/quen-somos/manifesto/esperanto)*, ProLingua postulas i.a. ke oni ne uzu ajnan leĝmezuron kaŭzontan al galegoj la perdon je la rajto uzi kaj scii la galegan lingvon kaj fari el tiu lingvo simbolon de galega identeco.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Galega_lingvo&oldid=6496625"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 17:05, 25 dec. 2018.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.